

Mensuel
Numéro 64
Avril-Mai
2010

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €



Kongres-foto : Alain Giffort
Muntado : Serĝo Sir'
Desegno : Lino Markovo



**De kongreso
ĉe maro...
...al alia...**



Interasocia Renkontiĝo
de Esperanto
ĉe Mediteraneo
22-26 de aprilo 2011

<http://esperantosete2011.fr/>

konkurso Nova emblemo por SAT-Amikaro

Dum la kongreso (kiu laŭ la unua plano devis finekti la emblemon) ne estis pritraktita la konkurso. Tio fakte ne estas ĝena, ĉar kiel konstateblas apude plu venas kontribuoj, k la komitato do decidis daŭrigi la akcepton de proponoj ĝis la somerfino, k la fina voĉdono okazos pere de la referendumo.

Ne forgesu, ke proponebblas ankaŭ motoj (pri kio, grafika talento ne necesas!).



Flore kuku ! Vintraj glaciaĵoj Frandebla ankaŭ alizezone... el paĉja kuirlibro

- 6 ovoĵ
- 60 g da sukero
- 50 g da kakaopulvoro
- 500 g da buterkeksoj en pecetoj
- 250 g da butero
- 100 g da migdala pulvoro
- 70 g da sekaj vinberoj
- 20 g da figoj

Miksu unue la ovojn kun la sukero en kaserolo kaj samtempe varmigu la tuton je malalta temperaturo dum proksimume 10 minutoj. Aldonu poste la kakaan kaj migdalan pulvoron. Bone miksu.

Aldonu la buteron, laŭeble jam iom mola, kaj bone miksu.

Aldonu unu post la alia, ĉiam bone miksante la keksojn, la vinberojn kaj la figojn.

Kiam vi havas homogenan paston, faru buletojn, aŭ iun alian formon, per kuleretoj aŭ simple per la manoj.

Lasu en la frostujo dum unu horo antaŭ ol manĝi, kaj poste lasu la ceteron nur en la malvarmŝranko.

Flora Markov



**Kongresaj
eĥoj**
(sekvo de la
kovril-paĝo,
kaj fino)
far Lino



Kongresaj eĥoj

Du novaj kongresaninoj en Hiliono

Trairante la tutan Francion (de Beziero ĝis San-Briego) ni alvenis al la domo Georges Palante en Hiliono. Enirante en la kongresan akceptejon la 3an de Aprilo ni havis la impreson esti en vasta birdejo, kie oni parolas Esperanton. Stranga mondo! Subite aperis amikoj kaj tuj post kelkaj kisoj, ni nin sentis hejme.

La afablaj akceptantoj donis al ni belan dosieron, en kiu ni trovis nian ŝildon kun verda rondforma memglua papereto ⁽¹⁾ kaj diversaj informoj pri la loko kaj la funkciado de la kongreso..

Do ni vizitis la kongresejon; salutis la konatajn samideanojn kaj konatiĝis kun la aliaj. Ĝaje ni babilis, ni babiladis... kaj iĝis birdoj en la birdejo.

Poste, legado de la programo: kunvenoj, vizitoj, libro servo, bretonia budo, Esperanto-Info budo, tabuloj pri Greziljono aŭ Bureso aŭ ĵurnaloj. Post la aĉeto de la «Koboldoj»⁽²⁾ trinkante kafon ni pripensis - kien iri: ĉu viziton, ĉu kunvenon, ĉu Hilionon? Ni devas elekti inter la diversaj ebloj.

Unue ni ĉeestis la prezentadon de la fama verkisto Louis Guilloux, kiu travivis sian infanecon apud la katedralo Sankta Stefano en San-Briego. La filmo kaj la sekvanta parolado interesis nin. Nun, ni pli bone konis la vivon kaj la verkaron de Louis Guilloux. Necesis por ni legi aŭ relegi liajn librojn.

Dum aliaj prelegoj, oni parolis pri diversaj nuntempaj, mondaj aŭ lokaj temoj sed ankaŭ pri esperantaj zorgoj: La Sago, kulturaj centroj.

La unuan tagon pluvis eĉ pluvegis. Poste sunis. Do ni promenis sur la vojo de la doganistoj kaj fotis la golfeton de San-Briego kaj ankaŭ sur la stratoj de la malnovaj kvartaloj de la ĉefurbo. En la restoracio vidalvide de la kongresejo ni manĝetis kaj pagis per «koboldoj».

Nin tre allogis la vesperoj. Unue ni dancis kun la tradicia bretonia muziko.

Due la Asocio Interkant interpretis la «Ĝeneralan Kanton» de Pablo Neruda kaj Mikis Theodorakis. Franjo majstre gvidis la 60 korusanojn kaj muzikistojn el la tuta Francio. La muziko kaj la poemoj emociigis samtempe la spektantojn kaj la partoprenantojn de

la koruso. Longe daŭris la aplaŭdoj. Trie Esperanto-Vannes proponis agrablan teatraĵon: La atendejo. Multaj personoj atendis la kuraciston en la atendejo. Dum la longa atendado ili rakontis la kialojn de sia alveno ĉi-tie kaj festis la naskiĝdatrevenon de iu tiea virino per kantoj. Kiam finfine alvenis la kuracisto, ili ne plu bezonis lin kaj ili kontente rehejmeniris.

Postkongrese ni partoprenis en la orienta ekskurso de Lehon kaj Dinan. Ni multe ŝatis la abatejon kaj la fortikaĵon de tiu vilaĝo sur la rivero Rance. Posttagmeze la buso haltis sub la muregoj de Dinan. De tie ni supreniris ĝis la malnova centra kvartalo. Ni promenis ĝis la strato Jerzual, eks-enirejo de la urbo en Mezepoko, kaj ni subiris per forta deklivo ĝis la haveno.

Ni loĝis en la junulgastejo en San-Briego. Ĉiutage buso veturis nin ĝis la kongresejo, kie ni travivis la tagon. Tie ni manĝis bongustan, ekokultivan, bretonan nutraĵon. Ni ankaŭ scivolis pri la organizado kaj la realigo de tiu kongreso, ĉar la venontan jaron, akceptos la kongresanojn nia regiono. Kia respondeco por ni! Ni esperos esti tiel efikaj kaj tiel ridetantaj kiel la teamo de Hiliono.

Estis nia unua kongreso kaj ni bonŝancis. Ni gratulegas ĉiujn.

Line kaj Geneviève

Serĝaj notoj:

(1) Tiun markon ricevis la kongresanoj, kiuj unuafoje SAT-Amikare kongresis. Tio tre utilis, ekzemple, por indulgi ilin kiam ili alvenis akurate al la labor-kunvenoj, kio ja estas kruda malrespekto al la SAT-Amikaraj kongresaj tradicioj.

(2) La «Koboldoj» estis la speciala mon-unuo en la Hiliono-kongreso. Ja niaj bretonaj kamaradoj ofte emfazis siajn asteriksecojn, kaj do tute normale malfacile povus aliĝi al ideo de komuna eŭropa mon-unuo. Tamen, por ne ofendi la ne-gaŭlojn, ili kreis mon-unuon ne pli valora ol eŭro, kvankam evidente ne malpli (kio bonŝance simpligis la rilatojn emociajn kaj matematikajn inter la du mon-unuoj kaj ties posedantoj).

S.

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo
Kongresoj: de eĥoj ĝis antaŭsono...
 - 2 Nova emblemo
Flore kuku
 - 2-4 kongresaj eĥoj
 - 5 Komunumo de 1871
 - 6 Statistiko pri senlaboreco kaj dungiteco (tria kaj lasta parto)
 - 7 Impeto de kooperativo.
Selle-humuraĵoj
 - 8 SAT kongreso
Kotizoj!!
- Supplément en français**

 - 9 Fomation universitaire...
CGT Catalane
Echo du congrès de Hillion
 - 10 Hillion
 - 12 Disque, cours SAT, SAT-Amikaro
- 13 Utilaj informoj
Libro-Servo
 - 14 Libro vivas pli ol unu sezono: Dis!
 - 15 SAT-EFK Dokument-filmo
 - 16- Kiel esperantigi proprajn
 - 17 nomojn -11
Parkinson-malsano
 - 18- Esperantistoj aktivas
 - 19
 - 20 Ni pozitivu! / Ĉe la lago.

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
J. L.	Carré
Geneviève	Gaubert
Alain	Gilfort
Véronique	Girard
Louis	Gohin
Françoise	Guihaumé
Isabelle	Lamy-Rested
Mikaelo	Lavergne
Jak	Le Puil
François	Lo Jacomo
Flora	Markov
Lino	Markovo
Vinko	Markovo
Vito	Markovo
Guy	Martin
Line	Maurel
Chantal	Millet
Jean	Selle
Serĝo	Sir'
Juliette	Ternant

Kongresaj eĥoj...



Dum transalpa kongresano ronke eĥas, pseŭdo-Gaŭlo sinkredanta nereduktebla, ankaŭ eĥas, sed korne, eĉ eble incite...



El nia leterkesto

Ĵaudon, la 8an. de Aprilo 2010

Karaj Kongresorganizintoj,

Mi volas danki vin por via tre belega kongresorganizado en Hiliono.

Tiu estis mia unua kongreso.

Mi lernas esperanton de du jaroj kaj mi ne ankoraŭ estas tre lerta sed mi tre ŝatis aŭdi ĉiujn kongresantojn, preskaŭ ĉiujn, babili esperante. Mi sentis tiel, kiel mi estis en Anglio, lerninte la anglan.

Plezure, mi malkovris diversajn esperantistajn akĉentojn, kelkajn belegajn.

Ĉio estis preparita por bona akceptado kaj por interesaj laborkunvenoj aŭ prelegoj. Mi interesiĝis pri la projekto de dokumentara filmo pri Esperanto. Mi lernis multajn aferojn pri SAT, SAT-Amikaro kaj La Sago.

Mia edzo venis kun mi. Li ne lernas esperanton, sed li ankaŭ ŝatis tiujn tri tagojn en Hiliono. Li ĉeestis kelkajn kunvenojn aŭ prelegojn kun mi, ĉefe la prelegojn en la franca. (Ni trovis la prelegon-debaton pri «La bataille de l'eau» interesege, klarega kaj dokumentega.)

Mi scias ke vi havis problemon gasan, tamen ĉiuj kongresantoj povis trankvile, sane kaj bone manĝi. Brave!

Dankon ankaŭ por viaj paperinformoj kaj kongreslibro.

Ĉar la organizado estis bona, ĉio trankvile okazis kaj dum tiuj tri tagoj, dum debatoj mi sentis etoson de malstreĉo, libereco, reciproka aŭskultado kaj demokratio.

Ni ne forgesu la kulturajn aspektojn. Multe plaĉis al mia edzo kaj mi, la agrablegaj vesperoj: ni bretone dancis! Kun grandega plezuro. Ni admiris kaj ŝatis la muzikistojn kaj la kantistojn. Vesperoj kun varma kaj kortuŝa etoso.

Ni ne partoprenis la vizitojn sed ni paŝis laŭlonge de la sanbriega golfo kaj veturis al Erquy, laŭlonge de la marbordo. Hiliono kaj ĝia regiono estas grandiozaj kaj vidindaj!

Mi tutkore dankas kaj salutas vin.

Isabelle Lamy-Rested

Post la kongreso propono de perantino

Dum la kongreso, ni debatis pri rolo de la perantoj (delegitoj). Ni substrekis la gravajn taskojn de André Sadier, kiel (eks)kasisto, interalie por realvoki la membrojn, kiuj forgesis kotizi.

Jen propono de Françoise Guihaumé, perantino en regiono Luarlandoj.

Se ĉiu delegito estos informita pri la nomoj de la abonantoj kaj de la kotizantoj, pri iliaj poŝtaj kaj retaj adresoj, kaj telefonnumeroj (t.e. pli komplete ol nun), tiam eblos al li kontakti kelkajn por inciti ilin iĝi delegitoj... (kial ne!), esti informata ekz post la kongreso pri tiuj, kiuj ankoraŭ ne rekotizis, ne reabonis, kaj tiel esti peranto por kontakti la malfruiĝintojn... ĉar mi bone komprenis, ke tio estas multe da laboro por unu sola persono.

Françoise Guihaumé

De la Komunumo de 1871 ĝis hodiaŭ, Defendi kaj plibonigi la publikajn servojn

El la riĉa k varia verko de la Komunumo de Parizo, ni ĉi jare fokusiĝas pri la defendo de la publikaj servoj.

Jam de la 18a de marto 1871, unua tago de la insurekto, la Komunumo organiziĝas por certigi la funkciadon de la publikaj servoj. Urĝas ĉar Tierso (Thiers) postulis de la funkciuloj k ŝtatdungitoj forlasi la ĉefurbon kunprenante la materialon, monon k arĥivojn. Malgraŭ tiu trudordono, unu funkciulo el kvar restis ĉe sia posteno.

La centra Komitato de la nacia Gvardio devas dungi novajn oficistojn por anstataŭigi tiujn, kiuj fuĝis al Versajlo, k nomumi respondeculojn ĉekape de la ĉefaj servoj (Financoj, Sano, Justico, Edukado, Kulturo, Poŝto, Fervojoj, Moneroj k medaloj, Nacia presejo, Ruboj...).

La komunuma asembleo, elektita la 26an de marto, kompletigas tiujn urĝajn decidojn kreante komisionojn, kiuj pri laboras dekret-proponojn antaŭe pridiskutitajn kun la popolaj organizoj: Kluboj, nacia Gvardio, sindikataj Ĉambroj, sekcioj de la Internacio, komitatoj de la inara Unuiĝo, artistara Federacio...

En la ekstreme malfacilaj kondiĉoj de ĉirkaŭado de la ĉefurbo k nepreco pri defendado kontraŭ la versajlaj agresantoj, la publikaj servoj funkcios laŭ modela maniero k respondos al la tujaj bezonoj de la popolo. Sub kontrolo de la civitanoj, ili certigas la nutroprovizadon por la ĉefurbo, la sukuradon al bezonantoj, la flegadon de la sanservo, la funkciadon de hospitaloj k publika helpejo, la sekurecon k justicon, la malfermon k laikigon de lernejoj, la kolekton k disdonon de la poŝtaĵoj, la malfermon al la publiko de la muzeoj, bibliotekoj, spektaklejoj, la kolekton de impostoj necesaj al funkciado de la servoj k al pagado de la salajro de la nacigvardianoj...

La ekzemplodona maniero, laŭ kiu la Komunumanoj kapablis demokrate regi la publikajn servojn estos larĝe agnoskita k inspiros la demokratiajn k progresemajn movadojn de la 20a jarcento, notinde dum la Popolfronto k ĉe la Liberigo tra la programo de la Nacia Rezistada Konsilio.

Hodiaŭ, tiuj antaŭeniroj estas grave endanĝerigitaj de la heredantoj k posteuloj de la versajlanoj. Sed la atakoj kontraŭ la funkciado de la publikaj servoj, la privatigoj estas forte kontraŭbatalataj de la salajritoj, la uzantoj k iliaj organizoj. Kiel dum la tempo de la Komunumo, lukti por la protektado k plibonigado de la publikaj servoj, tio estas verkado de demokratio k moderna batalo.

Por daŭrigi k pliigi tiujn batalojn, ni retroviĝos

sabaton 29an de majo 2010

je 14a30

ĉe la enirejo de:

cimetière du Père Lachaise,

Rue des Rondeaux,

Paris 20e - Métro Gambetta

Unuaj organizaĵoj alvokantaj al partopreno:

ACER (L'assoc. des amis des combattants en Espagne républicaine)
ARAC
ASSOCIATION ACTION
ASSOCIATION LOUISE MICHEL
Caisse Mutuelle Complém. et d'Action Sociale des Indus. EDF GDF des Hauts de Seine (CMCAS 92)
CER SNCF NORMANDIE
COMPAGNIE JOLIE MÔME
GAUCHE UNITAIRE
INSTITUT D'HISTOIRE SOCIALE CGT
INSTITUT D'HISTOIRE SOCIALE CGT PTT
LA LIBRE PENSEE
LES VERTS, PARIS ECOLOGIE
LIGUE DES DROITS DE L'HOMME, FEDERATION DE PARIS
LUTTE OUVRIERE
MOUVEMENT DES JEUNES COMMUNISTES FRANCAIS (MJCF)
MRAP
NOUVEAU PARTI CAPITALISTE (NPA)
NPA PARIS
PARTI COMMUNISTE FRANCAIS
PARTI COMMUNISTE FRANCAIS, FEDERATION DE PARIS
PARTI RADICAL DE GAUCHE
PARTI SOCIALISTE
PARTI SOCIALISTE, FEDERATION PÔLE DE RENAISSANCE COMMUNISTE EN FRANCE (RPCF)
REPUBLIQUE ET SOCIALISME
RESISTANCE SOCIALE
ROUGES VIFS ILE DE FRANCE
SECTION CGT DES RETRAITES CHEMINOTS PARIS SUD OUEST
SECTION COMMUNE DE PARIS DU PARTI SOCIALISTE DU 20e ARRONDISSEMENT
SECTION DU PARTI COMMUNISTE FRANCAIS DU 11e ARRONDISSEMENT
SECTION DU PARTI COMMUNISTE FRANCAIS DU 19e ARRONDISSEMENT
SECTION DU PARTI COMMUNISTE FRANCAIS DU 20e ARRONDISSEMENT
SECTION LEON BLUM DU PARTI SOCIALISTE DU 11e ARRONDISSEMENT
SYNDICAT CGT DES RETRAITES PTT DES BUREAUX GARES ET AMBULANTS
SYNDICAT CGT HOPITAL SAN SALVADOUR
SYNDICAT DE LA MAGISTRATURE
UNION CONFEDERALE DES RETRAITES CGT
UNION DES FAMILLES LAÏQUES
UNION REGIONALE CGT DE L'ILE DE FRANCE

Kaj SAT-Amikaro, kompreneble !



Statistiko pri senlaboreco kaj dungiteco: Kampo de politikaj manovroj (tria kaj lasta parto)

Unu monaton poste, la statistikisto de la ministrejo pri Dungiteco trovis subtenon ĉe multaj ekonomikistoj kaj universitatoj, por peti interrompon de la ĉiumonata publikigo de la procento da senlaboreco, sed inter la du balotadoj pri la prezidenteco la nekorektita procento estis aplombe publikigita. En la ĵurnalo *Le Parisien* de la 27-a de aprilo 2007 la sama gazetisto, kiu estis specialigita pri la ekonomiaj aferoj, aŭdacis diri, ke «la procento da senlaboreco, laŭ difino estigita de la Internacia Buroo pri Laboro, falis en la nombron de 8,3, kio konsistigas la plej bonan rezulton dum la 25 pasintaj jaroj» Kelkajn monatojn poste, la koncerna merita gazetisto eniros en la kabineton de la ministrino pri Financoj *Christine Lagarde*. De sia flanko, la kandidato al la prezidenteco *Nicolas Sarkozy*, kiu estis eksa ministro pri Ekonomio, ne maltrafis la okazon fanfaroni pri sia «sukceso» dum televida debato kun la socialista konkurantino *Ségolène Royal* pri la koncerna funkcio.

Fronte al la kontestado, la implikiĝintoj en la statistikaj falsajoj klopodis, por prepari eliron el la krizeco, tiel ke la ŝajno estu ŝirmita. Konsistanta el specialistoj de diversaj administracioj kaj el reprezentantoj de sindikatoj kaj de la kolektivo tiel nomita «La aliaj nombroj pri la senlaboreco» (franclingve *Les autres chiffres du chômage*), diskutgrupo estis starigita de la Nacia Konsilio de la Statistika Informado en marto 2007, por interparoli pri la indikaĵoj rilataj al la dungiteco, la senlaboreco, la subdungiteco kaj la dunga malcertaĵo, kiujn la publika statistika sistemo devos estigi. En junio 2007, la ĉefministro petis de la Ĝenerala Inspektoservo de la Financoj kaj de la Ĝenerala Inspektoservo de la Socialaj Aferoj raporton pri la sama demando, por verŝajne malstabiligi la diskutgrupon starigitan de la Nacia Konsilio de la Statistika Informado. Jam en septembro 2007 la ĉefministro disponis la petitan raporton ; kelkaj volaj maldiskretaĵoj aperis en iuj gazetoj, por sugesti malgravan modifon en la procento da senlaboreco : 8,3 procentoj laŭ la gazeto *Les Echos*, 8,4 procentoj laŭ la gazeto *Le Monde*. Tamen nenio estis dirita pri la fakto, ke en la raporto troviĝis rekomendo pri ŝanĝo de la maniero kalkuli la procenton da

senlaboreco. Oni devas konfesi, ke la raporto estis lertaĵo sur la kampo de la redakta procedo, por gvidi la legantojn al la celata konkludo, sen riski riproĉojn pro kaŝo de faktoj.

En novembro 2007, la Nacia Instituto de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj adoptis novan metodikon bazitan ekskluzive sur la enketaj demandoj pri dungiteco ; tio kondukis al malaltigo je proksimume 1 procento da senlaboreco kompare kun la nombro montrita de la antaŭa metodo. Okaze de la kampanjo por la prezidenteco la kandidato *Nicolas Sarkozy* estis difininta celon de 5 procentoj da senlaboreco por la jaro 2012. Per artefarita malaltigo de proksimume 1 procento post la anonco farita de tiu kandidato, la Nacia Instituto de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj helpis lin en kvarono de la iro al lia celo.

La publikigitaj novaj procentoj da senlaboreco tiel fariĝis tre proksimaj al la provizoraj taksadoj konigitaj inter la mezo de la jaro 2006 kaj tiu de 2007. Tiel la manipulado estis maskita, sed ĝi fariĝis okulfrapanta, kiam oni atentis la evoluadon de la procento da senlaboreco inter la mezo de la jaro 2005 kaj tuj antaŭ la balotado pri la prezidenteco : ĝi ne malaltiĝis en la nombro de proksimume 2 procentoj kredigitaj de falsitaj indikoj, sed nur en la nombro de 0,7.

Kiam en februaro 2007 estis alprenita la decido forigi la novdungajn kontraktojn, tiam la nombro de la koncernataj salajruloj finfine estis konigita : en la fino de la jaro 2006, 210.000 personoj estis nombritaj, tio estis kvarono de la nombro da deklaroj pri intencoj dungi utiligita por la komunikado farata de la registaro sub la gvidado de la ĉefministro *Dominique de Villepin*. Fakte, la koncerna temo ne plu estis aktuala.

Post tiu polemiko, la rolo de la enketaj demandoj pri dungiteco pli gravis ekde la aŭtuno 2007. La rezultoj de la koncernaj enketoj estis trimestre publikigitaj, sed la nombro da dungopetantoj daŭre kaj vaste aperis en la mediatoj en la fino de ĉiu monato. De alia flanko, en marto 2009 okaze de rebakado de la kategorioj de dungopetantoj, la direktoro de la Direkcio por la Impulsado de Esplorado, Studado kaj Statistiko kaj tiu de la

Centro de Dungiteco ĵetis konfuzon en sia komunikado pere de reliefigo de subkategorio de enskribiĝintoj, kies nombro estis proksimume tiu de la anoncitaj senlaboruloj. Uzo de tiu subkategorio de dungopetantoj estos daŭre ebla, kiam proksimiĝos la tempo de balotadoj.

Kun sia volo «forĝi la publikopinion» en preskaŭ perfekta akordo kun la ĉefaj mediatoj la politikistoj ne hezitas kredigi la taŭgecon de sia agado pere de abundo da nombroj plej ofte uzataj ekster la cirkonstancoj, sub kiuj ili estis ellaboritaj. Tiam la publika statistiko fariĝas maŝino, por rakonti fabelojn kaj por formi publikopinion laŭ la usona modelo tiel nomata *storytelling* (familiare : mensogi).

Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la 2-a ĉapitro de la libro titolita *Le grand truquage*, verkita de kolektivo da statistikistoj sub la pseŭdonimo *Lorraine Data*, eldonita de la firmao *La Découverte* en majo 2009.



Impeto de kooperativoj, aŭ memadministrado.

El l'«Humanité-Dimanche» de 19a ĝis 25a de Novembro 2009:

Kiel aseroro en la laborotribunalo, persone, mi devis juĝi iujn posedantojn, kiuj foriris senpage lasante la laborejojn malplenaĵ.

Ĉiokaze, mastraj aseroroj ne povis absolvi tiujn ulaĉojn. Certe, estas facile ĉar la lando estas insulo (NDLR: Nov-Kaledonio), kun sola flughaveno. Mi neniam surloke aŭdis pri kooperativoj. Tiuepoke, estis danĝere, ĉar tiu speco de iniciato ne povis sukcesi, ĉar jam sindikatistoj estis tre minacitaj en siaj faradoj, kaj ĉar la tuta ekonomio troviĝis en la manoj de kapitalistoj potencaj, kiuj ankaŭ estris politikan povon.

La gazeto «l'Humanité-Dimanche», sciigas nin ke kvin sindikatistoj maldungitaj senhonte, sen labor-pagoj, kiel 29 aliaj salajruloj, kreis sian firmaon, en urbo *Trith-Saint Leger* (Nordfrancio). Temas pri kooperativa societo de produktado (en franca lingvo: «Société Coopérative de production»). «La statuto de tiu firmao povas esti simila kiel principo de memadministrado». La «Generala konfederacio de Laboro» (CGT) multe interesiĝas pri socia kaj solidara ekonomio dank'al formado-seminarioj.

En la kooperativa societo de produktado, la mastrumado kaj decido estas komunaj, verŝajne de ĝeneralaj kunvenoj.

Niaj kamaradoj sukcesis, sed, por «SCOP/Peinture», necesis komenci per kapitalo de 18.000 eŭroj (de 3 asocioj)... Pri tio, ni ne vidu alian specon de kapitalismo, sed rekte iniciaton de vera memadministrado.

«La SCOP» hodiaŭ, nombras 6 anojn kies salajroj estas la samaj kiel antaŭe. Ne plu ekzistas tiu problemoj de horoj kiuj estis penigaj.

En «l'Humanité-Dimanche», ni tion legas «La komenco estis rapida, kaj mendoj pliĝis, ĉar ili povis investi 15.000 eŭroj en aĉetado de la materialo. En la «SCOP», sendube la etoso estas pli bona... inter kamaradoj. Ja, kiel estas asertite, necesas pagi la provizistojn, salajrojn, kaj ŝarĝojn, sed ankoraŭfoje, plejgrave, por niaj kamaradoj, gravas ne plu dependi de parazito, kaj ankaŭ voremaj, tropostulemaj akciuloj.

Necesas memori la provon de «LIP», en Bezanco, dum jaroj 1970, sed grundo ne estis preta. Tamen, la sperto ankoraŭ estas menciata por obstakloj, kaj eraroj.

La ĉefministro Pierre Messmer decidis ke «LIP» devu fermi. Nun, la kooperativoj «SCOP» estas helpataj de multe da salajruloj kiuj ne plu akceptas maldungojn, sen reagi. Bedaŭrinde, iuj firmaoj translokiĝis, aŭ la eksalajruloj, pro juĝa decido, ricevis nur kompenssumon... dentoŝtopilojn.

Laŭ fonto de CNCRES, kiu estas speco de panoramo, oni kalkulas, ke, en Francio, la soci-solidara ekonomio konsistas el 2,145 milionoj da salajruloj, kiuj laboras en 283 entrepenoj, do 9,8% da salajruloj.

1,675 milionoj de tiuj salajruloj estas dungitaj de 160.000 asocioj. 220.000 kooperativoj laborigas 300.000 salajrulojn. La soci-solidara ekonomio fakte montras pligrandiĝon de 3 aŭ 4 %, laŭ plena periodo aŭ laŭ nombro de salajruloj.

750.000 kooperativoj estas detale nombritaj tra la mondo, kaj oni povas kalkuli 100.000 salajrulojn kiel societanojn.

Konklude, tiuj spertoj estas tre interesaj por efike batali kontraŭ kapitalista nesatigeblulo.

Necesas konigi la eblecon de certaj rimedoj, de multobligoj de «SCOP». Miaopinie, tiuj spertoj povos esti la komenco de nova mondo.

Laboristoj el ĉiuj landoj, unuiĝu !

Louis Gohin



Selle humuraĵoj

Filistra logikeco



Ĉu ekologia taksado de la rentoj plimalbonigos la socialajn rilatojn ?



Tro malfrue !



SAT-Kongreso en Braŝovo



La 83-a kongreso de SAT okazos inter la 1-a kaj la 6-a de aŭgusto 2010 en Braŝovo, Rumanio.

Ĉiuj praktikaj detaloj - inkluzive de aliĝilo - aperas en Sennaciulo, kaj estas krome rete legeblaj ĉe la jena adreso:

<http://satesperanto.org/Bazaj-praktikaj-informoj,1537.html>

Eblas krome turni sin rekte al:



Rodica TODOR B-dul Valea Cetatii 22, bl. B 24, sc. A, ap. 5, 500289-Brasov, Romania, tel.+40 722 792849, <rodica_todor@yahoo.com>

Por vojaĝi aviadile el tuta Eŭropo al Bukareŝto, oni povas uzi malmultekostajn flugagentejojn «Wizz Air» kaj «Blue Air». La prezoj dependas de la elektita tago aŭ flugo. Eblas uzi Wizz Air tien kaj Blue Air reen aŭ inverse, se la proponitaj flugoj aŭ prezoj ne estas konvenaj. Komparocele, la prezo de ekzemple «Brussels airline» estas 225 € kie oni por 109 € povas atingi Bukareŝton pere de «Wizz Air».

Por antaŭmendi biletojn, konsultu: www.wizzair.com aŭ www.blueairweb.com

La programo entenos riĉan kulturan parton kun variaj ekskursoj, inter kiuj ebleco postkongresi krozante sur la natura rezervejo de la Danuba delto. Gravan parton okupos ankaŭ laborkunsidoj, kaj sociaj forumoj pri socipolitikaj temoj, interalie pri ciganoj.



Du 1er au 6 août 2010, à Brașov en Roumanie, venez découvrir les Carpates.

Pendant le congrès de SAT-Amikaro, Rodica Todor est venue présenter le congrès de SAT organisé dans sa ville. En particulier, elle a nous a invité à venir débattre avec les roumains et d'autres espérantistes de pays d'Europe de l'est, qui après avoir vécu 40 ans sous le joug de l'Union soviétique sont aussi aujourd'hui pris dans la nasse d'un capitalisme sauvage.

Les débats s'annoncent riches et variés, comme les paysages et les sites historiques qui sont proposés en excursions.

Le comité d'organisation vous invite à remplir votre bulletin d'adhésion: www.satesperanto.org.



Cotisations

Avez-vous réglé vos cotisations 2010 d'adhésion à SAT-Amikaro et/ou d'abonnement à La Sago?

Environ la moitié des membres ou abonnés ont déjà régularisé leur cotisation 2010; il ne reste plus que ... l'autre moitié!

Dans la Sago 65 de juin, le bulletin d'adhésion 2010 sera publié; examinez la feuille d'adressage de votre revue: nous essaierons d'y faire figurer régulièrement votre situation de cotisation afin d'éviter les envois coûteux et consommateurs de temps des courriers de rappel.

Guy Martin, trésorier de SAT-Amikaro

Ĉu vi jam pagis viajn kotizojn 2010 pri aliĝo al SAT-Amikaro kaj/aŭ abono al La Sago?

Ĉirkaŭ duono el la membroj aŭ abonantoj jam pagis sian kotizon 2010; plu restas nur... la alia duono!

En La Sago 65 en junio, nova aliĝilo 2010 estos eldonita; atentu la adresfolion pri via revuo: ni provos, ie en ĝi indiki vian kotizstaton, por ŝpari kostajn kaj tempovorajn sendadojn pri realvokoj.

Guy Martin, kasisto de SAT-Amikaro

Kotizoj

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Une formation universitaire pour les cadres de la culture espérantophone !

En septembre 2010 débutera en Hongrie un enseignement spécialisé destiné à former des organisateurs professionnels d'événements en espéranto et des cadres internationaux de la culture espéranto.

C'est l'Institut de Formation des Adultes de l'Université de Szeged qui propose à ses étudiants une spécialisation d'un an comprenant :

- l'étude de la langue internationale pour les amener au moins au niveau «B2» (niveau «avancé» ou «indépendant»),
- l'acquisition des connaissances spécialisées sur l'organisation des manifestations culturelles,
- la participation au plus grand nombre possible de rencontres espérantistes.

Forts de leur propre expérience et

des connaissances spécialisées qu'ils auront étudiées, ils pourront ainsi se préparer à l'organisation d'événements et de programmes du mouvement espérantiste, le tout avec un haut niveau professionnel.

Cette spécialisation a déjà été choisie par 25 étudiants. Ils commenceront l'étude de l'espéranto sous la direction de Mme Ladányi Ildikó, professeur de langues.

Les connaissances spécialisées sur l'organisation des événements et la gestion de la culture leur seront enseignées en hongrois.

En février, on a organisé pour les étudiants un week-end intensif d'initiation aux bases de la langue.



A notre connaissance, cette intégration de l'espéranto à la formation des cadres internationaux de la culture est une première.

Traduit de l'espéranto par J. L. Carré
Source : Ret-Info
<http://www.eventoj.hu>



La CGT catalane vote une résolution en faveur de l'espéranto

Résolution

La 9ème Congrès de la Confédération Générale du Travail de Catalogne ;

Considérant le besoin urgent d'une coopération internationale pleine et entière de tous les libertaires dans le combat contre le capitalisme, Considérant que cette coopération doit impérativement se faire en respectant les principes de la démocratie directe, qui ne peuvent être mis en application que par l'utilisation d'une langue internationale commune,

Considérant qu'il n'est pas possible que cette langue commune soit une langue nationale, d'abord parce que la plupart des travailleurs éprouvent des difficultés à apprendre une langue naturelle, ensuite parce qu'il serait inacceptable qu'une partie du mouvement utilise sa langue maternelle

en tant que langue commune, tandis que les autres n'utiliseraient qu'une langue imparfaitement maîtrisée, et enfin à cause des problèmes idéologiques qui seraient générés de l'utilisation éventuelle, en tant que langue commune, d'une des langues actuelles des puissances colonialistes et hégémoniques,

décide

1. De déclarer que la langue internationale Espéranto est actuellement la plus adéquate pour la mise en place de relations horizontales et égalitaires entre les travailleurs du monde entier et entre les différentes organisations libertaires.

2. D'encourager tous les organes de la CGT à favoriser la diffusion et l'apprentissage de la langue internationale parmi leurs adhérents et

sympathisants.

3. De proposer à toutes les organisations libertaires d'encourager l'apprentissage de l'espéranto en tant que langue de travail pour la coordination du mouvement libertaire international.

Lleida, le 7 février 2010

Lire le texte original sur le site de SATEH (branche hispanophone de SAT, analogue à SAT-Amikaro, francophone) : <http://www.nodo50.org/esperanto/cgt.htm> et la version en espéranto sur le site de SAT (association mondiale « mère ») : <http://www.satesperanto.org/Gxenerala-Konfederacio-de-la.html>

Source : <http://www.rojoynegro.com>
(Rojoynegro.info 07 février 2010)
[info/2004/spip.php?article29388](http://www.rojoynegro.com/info/2004/spip.php?article29388)

Le 65e congrès de SAT-Amikaro à Hillion

Congrès annuel du 3 au 6 avril

Hillion, capitale de l'espéranto

**Conférences
concerts et théâtre
du 3 au 5 avril**

Dans le cadre du congrès de Sat-amikaro, l'espace Georges-Palante à Hillion accueille une programmation ouverte au public. Le 3 avril, de 15 h à 18 h, projection du documentaire *La loi Garibou*, (travaux de l'Union française de l'espéranto) en français. Le 4 avril, de 17 h à 19 h, débat en espéranto (avec traduction) sur les crises économiques, sociales et démographiques. Le 5, de 14 h à 16 h, conférence et débat en français sur la bataille de Fouen en Bretagne. Puis, de 16 h à 17 h 30, débat en espéranto (avec traduction) sur le thème des abeilles en danger. Le 3 avril à 20 h 30, initiation aux danses bretonnes et fast-nos par le groupe Mervil. Le 4 avril à 20 h 30, concert de guitare classique de Lino Merlo, suivi à 21 h 15 de *Conto general* de Pablo Neruda et Mikis Theodorakis, interprété en espéranto par le chœur interrégional Interart (sur réservation au 06 76 29 90 16). Le 5 avril, à 20 h 30, chansons avec Gijeno et à 21 h 30, théâtre avec la troupe espérantiste de Vanne (La Maretañ). Entrée gratuite.

Du 3 au 6 avril, le mouvement international d'espérantistes Sat-amikaro tient son congrès annuel à Hillion. L'association Espéranto 22, qui fédère les clubs du département, est co-organisatrice de l'événement. Deux de ses membres nous disent ce qu'est l'espéranto.

Langue internationale, l'espéranto est né en 1887 à l'initiative de Zamenhof, un ophtalmologue polonais de Bialystok. "Il vivait dans une ville peuplée de communautés différentes entretenant des relations souvent conflictuelles", explique Laurent Peuch, trésorier adjoint du club espérantiste de Saint-Brieuc. "Il s'est dit que si ces communautés parlaient la même langue, peut-être qu'elles se comprendraient mieux et qu'il y aurait moins de conflits. Il a donc créé une langue qui soit la plus facile possible à apprendre. Pour le vocabulaire, il a regardé parmi les huit ou neuf langues qu'il connaissait et a pris les racines les plus fréquentes".

**"Faire l'effort
d'aller vers l'autre"**

minent tous en "o", les adjectifs en "a", les adverbes en "e". "Pour les verbes, on a la même terminaison "as" qu'ils soient les pronoms et les verbes utilisés", poursuit Laurent Peuch. "C'est une simplification considérable, estime pour sa part Guy Martin, trésorier de Sat-amikaro et membre du club de Saint-Brieuc. Prenez la racine cheval. Sachant que le suffixe générique pour dire le féminin est "in", une jument se dira chevalino. Le suffixe pour dire "enfante de" est "id", ce qui donne chevalido, le poulin". Ainsi, l'espéranto évite l'apprentissage d'un grand nombre de mots et s'apprend très rapidement. "Pour moi, c'est un outil de communication qui permet d'échanger facilement et de débattre avec des personnes de cultures différentes, c'est une langue complémentaire de la langue native", affirme Guy Martin. Plus simple à apprendre que l'anglais, l'espéranto

comme autre avantage, selon nos interlocuteurs, d'être une langue neutre. "Une des critiques que l'on peut formuler sur l'utilisation de l'anglais comme langue universelle est que ce n'est pas une langue neutre. Lors d'un congrès de médecine par exemple, les anglophones vont être avantagés pour valoir leurs travaux. Avec l'espéranto, tout le monde est sur un pied d'égalité et doit faire l'effort d'aller vers l'autre".

**120 espérantistes
en Côtes d'Armor**

Selon Guy Martin, le nombre de locuteurs à travers le monde est de l'ordre de deux millions. La Chine arrive en tête. Viennent ensuite l'Europe et notamment sa partie Est où le succès de l'espéranto est étroitement lié à l'histoire. "C'était pour eux une manière de s'émanciper et de se relier à l'étranger. En Hongrie, on peut passer le bac avec espéranto en première langue". Pour ce qui est des Côtes d'Armor, les espérantistes sont environ 120, répartis dans des clubs dispensant des cours et des activités en espéranto. Celui de Plouézec, une trentaine de membres, s'est rendu célèbre grâce à sa rencontre internationale d'espéranto accueillant chaque année 150 personnes.

Laurent Le Baut

Espéranto 22
02 96 63 91 32
00 02 96 27 87 43
00 02 96 78 29 70

Guy Martin et Laurent Peuch, les deux membres d'Espéranto 22.



**Côtes d'Armor Magazine
mars 2010
Hillion, capitale de
l'espéranto**

Un des grands succès médiatiques fut la parution d'une page complète consacrée à l'espéranto et au congrès (sous le titre **Hillion, capitale de l'espéranto**) dans la revue mensuelle du conseil général des Côtes d'Armor en mars 2010, avec annonce photographique dans le sommaire en vis à vis d'un éditorial du président du conseil général (PCG) sur la vitalité de la vie associative. A noter que Claudy Lebreton est également président de l'association des PCG. Cette revue est distribuée gratuitement à tous les habitants

des Côtes d'Armor. Cet article nous a ouvert de nombreuses portes auprès de journalistes d'autres gazettes, radios et télévision locales. Il a aussi suscité des remarques bienveillantes de commerçants de proximité ou de la part de militants d'autres associations. Ce numéro édité en 285 000 exemplaires est encore disponible et «Espéranto 22» peut vous en expédier pour une utilisation en particulier auprès des élus locaux de votre proximité. Passez-nous commande à :

Espéranto 22
chez Alain Le Mau
9 rue de St aubin
22120 Yffiniac

**Armor TV
02 avril 2010
Journal**

Voici le texte de présentation du programme:

Jusqu'à Lundi Hillion accueille la 65ème édition du congrès national d'espéranto organisé par l'association des côtes d'Armor. Conçu à la fin du 19ème siècle, l'espéranto est une langue qui se veut universelle afin de faciliter la communication entre personnes de langues différentes et ce à travers le monde entier. Pour nous présenter l'espéranto Philippe STRIDE organisateur du congrès, et président de l'association Espéranto 22 est l'invité du journal.



**Radio france bleu armorique
02 avril 2010
2 minutes d'espéranto**



Radio france bleu armorique a diffusé à plusieurs reprises le 2 avril une émission de 2 minutes sur l'espéranto enregistrée dans la gare SNCF de Saint-Brieuc, qui a pour l'occasion accepté de diffuser en direct un message de bienvenue en espéranto.

dans la presse

(tous les articles sont accessibles sur le site du congrès: <http://www.esperanto-sat.info/article1627.html>)

Hillion infos 13 avril 2010 Un congrès national d'Espéranto à Hillion

Le blog de la commune d'Hillion a publié cet article le 13 avril après avoir chaleureusement hébergé le 65e congrès de SAT-Amikaro (du 03 au 06 avril).

Sat - Amikaro qui est l'une des associations gravitant autour de la langue Espéranto a choisi la commune d'Hillion pour son congrès national annuel. Durant les trois jours du week-end de Pâques, l'Espace Palante a accueilli la foule des congressistes dont le nombre dépassait 210. Les activités ont été nombreuses et variées, alliant les sujets sérieux lors de conférences en espéranto

ou en français et des spectacles : fest-noz, concerts. Dans l'esprit de solidarité humaine qui caractérise les espérantistes, et plus encore ceux qui sont membres de Sat-Amikaro (branche des francophones de SAT qui est orienté plus particulièrement vers le social), les habitants d'Hillion ont été conviés gratuitement à ces conférences et spectacles. Celui qui a été présenté le dimanche soir a été particulièrement apprécié par les spectateurs qui ont été transportés par la musique de Mikis Théodorakis magnifiquement interprétée par un chœur inter régional chantant en espéranto sur un texte très fort de Pablo Neruda.

Pour plus d'informations sur la galaxie Esperanto, vous pouvez naviguer sur les sites internet suivants :

- Association Universelle d'esperanto : <http://www.uea.org>
- Espéranto-France : <http://www.esperanto-france.org>
- Sat-amikaro : <http://www.esperanto-sat.info>



et aussi:

- **Le Télégramme** - 07 décembre 2009 : Espéranto 22. Cap sur le congrès de 2010
- **Le Télégramme** - 09 décembre 2009 : Espéranto 22. Un grand congrès en 2010
- **Ouest-France** - 15 décembre 2009 - Espéranto : un congrès en 2010 dans le département
- **Radio Clarté** - 2 émissions de radio enregistrées et diffusées en décembre 2009 et en mars 2010.



- **Timbres magazine** - mars 2010 - En espéranto: en page 8 ,une brève intitulé «En espéranto» annonce la parution du timbre à l'effigie du congrès.
- **Hillion Infos** - mars-avril 2010 - Espéranto 22

Le journal municipal Hillion Infos a publié dans son édition de mars-avril un article consacré au congrès que la ville a hébergé du 03 au 06 avril.



- **Le Télégramme** - 26 mars 2010 - Trois jours en avril consacrés à l'espéranto
- **Le Griffon** - mars-avril 2010 - Congrès espérantiste

Le Griffon, journal municipal de Saint-Brieuc, a annoncé dans les pages culturelles de son édition de mars-avril le congrès.

- **Ouest-France** - 02 avril 2010 - Trois mots pour présenter l'espéranto

De samedi à lundi, Hillion accueille un congrès national d'espéranto. Cette langue universelle a été créée par le Dr Zamenhof. « Son espoir à lui était de créer un langage commun permettant

une meilleure compréhension entre les peuples et donc de réduire les conflits. Une vision un peu utopiste. Néanmoins, l'espéranto a été reconnue par l'Unesco et cette langue vit encore partout dans le monde », résume Laurent Peuch, membre d'Espéranto 22, association organisatrice du congrès. Le congrès national d'Hillion sera l'occasion de le vérifier avec découverte de la langue, conférences, débats et spectacles.



- **Penthièvre** - 10 avril 2010 - Questions à Laurent Peuch.

Disque Afrika kompilo



Le projet AFRIKA KOMPILO a eu des difficultés à se mettre en place par manque de moyens, matériel musical inexploitable par manque de qualité technique, et aussi parce que le projet à démarré en pleine crise du CD.

Cette compilation rassemble deux EP : Kiu lingvo (8 titres) de Konga Espero et Mayoma kun JoMo Afrikumas (7 titres) et trois titres du groupe de Dido Fundu, Vigla Muziko. Ils ont été mixés, mastérisés et compilés au Studio de la Trappe / Vinilkosmo sur le même album intitulé AFRIKA KOMPILO et édité par Vinilkosmo.

Ce projet à pu aboutir grâce à des échanges de solidarité internationale entre artistes, techniciens, graphistes et producteurs du Congo (Kinshasa), d'Allemagne, d'Espagne et de France (Donneville, Tournefeuille, Toulouse et région Parisienne).

CD 20 titres - 77:13 min. - 18.00€
Produit par Vinilkosmo © 2010
<http://vinilkosmo.com>

Cours et stages Bourgogne

Cours d'espéranto dans la Côte d'Or (21) :

Dijon :

Des cours ont lieu à :
«Maison des associations»
rue des Corroyeurs
21000 DIJON

chaque mercredi de 18h30 à 20h00 (cours pour débutants)
par Laurence SACONNET et Daniel BIRO-WALKER

Quétigny :

Des cours ont lieu au :
CSC Léo Lagrange
3 rue des prairies
21800 QUÉTIGNY

chaque Jeudi de 20h15 à 21h45
cours pour débutants par Manon PERNOT

activité pour avancés sur le thème «découverte du Japon»

par Daniel BIRO-WALKER

tous les mardis de 18h30 à 20h00
cours pour avancés par Alain DROYER

Contact : Daniel BIRO-WALKER,
06 16 98 92 06, danielbirowalker
chez free point fr

Cours d'espéranto dans l'Yonne (89) :

Migennes :

Des cours ont lieu à :
«Local d'Acticom89»
3 rue Ampère
89400 MIGENNES

Les premiers et troisième lundi de chaque mois de 19h00 à 20h00 (cours pour débutants) de 20h00 à 21h00 - La vie Espérantiste (congrès internationaux, la naissance de l'espéranto, etc.)

Contact : Jean-François BLIN,
03 86 73 22 71, esperanto chez cegetel.net

<http://www.ccey-gki.perso.cegetel.net/>

Qu'est-ce que SAT et SAT-Amikaro?

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda: Association Mondiale Anationale), fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur la culture et l'éducation populaire. Elle utilise l'espéranto comme langue de travail.

www.satesperanto.org

SAT-Amikaro (l'amicale de SAT), l'Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française, fondée en 1945, est l'association espérantiste de langue française qui s'occupe de diffuser et enseigner l'espéranto en francophonie dans les milieux progressistes et permettre ainsi l'accès à SAT.

www.sat-amikaro.org

Renseignements utiles

Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : Claude Glady, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépôt légal à parution.

LA SAGO - Avril-Mai 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Utilaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado : ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, ĉiun ĵaŭdon, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj ĉiun vendredon je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Triagrada: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilondoj de SAT-Amikaro okazas ĉiun duan merkredon de la monato, je la 11h45 ĝis 14h30 kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis 25-jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 €; Svisio: 3,80 F.S.; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-

Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

N° IBAN, (por pagi el fremda lando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** Claude Glady :

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Korektskipo: Andreo Andrio, Ĵak LePuil,

Vito Markovo, Serĝo Sir'

Helpas al la korektado: Janine et Yannick

Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, tekstoj en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligado (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Reproso de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris
Tel.: 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02
TTT-ejo: <http://www.esperanto-sat.info>
Reto: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto: claud.gerlat@orange.fr

Claude Glady : Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean : Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto: lasago@free.fr

SAT: Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris

Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;

Sabate 11H-18H)

Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org

CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoĵo
Al ĉiu mendo aldonu:
40 % ĝis 5€
35 % ĝis 10€
25 % ĝis 20€
20 % ekde 20€



Disko Samideano Eterne Rima

Japanio

KD 18 titoloj - 65:03 mn - 16 €

Produktita de Eterne Rima / Vinilkosmo © 2010

Igor Wasilewski, alinome Eterne Rima, origine el Pollando kaj nun loĝanta en Tokio, esperantistiĝis en 2000, ĉarmita pro la beleco kaj karaktero de esperanto.

Jam partopreninte en nia «Elektronika Kompilo» (VKKD53) per la furora «Planedo Esperanto» el lia dua klubdanca projekto titolita «Lunatiko», Eterne Rima revenas al ni kun tiu ĉi nova albumo, kvintesenco de pura krunka hiphopo moderna kaj de arenbio (R&B) en esperanto.

«Samideano» estas la unua albumo en tiu ĝenro en esperanto laŭ tre aktuala hiphopa stilo «Dirty South» (fisuda repo) fama

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

en la sudaj ŝtatoj de Usono, kaj kiu rapide disvastiĝas sur la tuta terglobo.

La repaj tekstoj temas pri mono kaj la vivo de la riĉuloj, la rilatoj inter viroj kaj virinoj, kaj kelkaj viglaj kritikoj pri la mokuloj de esperanto kaj pri la eternaj komencantoj!

Krome en la albumo estas 15 MP3-aj duoninstrumentaj titoloj por karaokeo kaj 6 bonusaj remiksajoj.

(Ankaŭ vidu pri *Afrika Kompilo* en la franca suplemento)


Pri Eterne Rima... vi ja scias, ke mi ne speciale ŝatas Hiphopon au repon... sed tiu artisto havas senkonteste talenton kaj lia kanzono «Jam ne plu estas mok'» trafe parolas pri multaj esperantistoj, en stilo multe supera al «Fek' al E-o»...

Ĵak Le Puil

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Dis!



Originala romano de Sten Johansson, FEL 2001, 131 paĝoj. Prezo ĉe la Libroservo: 13,50 €


Romano pri disiĝo: infano, edzino, kromedzino, ĉiu povas iĝi disiganto. Ne facilas kuni, malfacilas disiĝi! Tiel iras la viv'! Same en Esperantio. Ja *Dis!* estas «humura kaj matura». Aserti (dorspaĝe) ke «Sten Johansson superas Louis Beaucaire» ŝajnas al mi troige...

La *Fabeloj de la verda pigo* de Beaucaire estas laŭ mi pli bone strukturitaj. Pri humuro ili nedubeble najbaras. Kiam nia heroo volas «kabeiĝi», tuj samklubano rebatas: «Oni ne kabeiĝas! Laŭ PIV oni kabeas!»

Sten Johansson retrovas kun tiu ĉi romano sian vervon de *Denaska kongresano*, kun epizodoj teneraj, ridigaj – vizito al amo-terapiistino – kaj satira rigardo pri la esperanta

popolo. Aldoniĝas ke la parola lingvo estas tute vigla: “Kun kiu vi venis ĉi tien? Ja vi ne estas sola?” – “Kun amikoj. Neniu, kiun vi konas.” – “Ĉu iu ulo?” – “Kaj kaj.” – “Kiel kaj-kaj? Kion tio signifas? Ĉu li estis kaj-kaj?” – “Kaj uloj kaj inoj, kompreneble.» Ek al legado!

Jak Le Puil,
LKK 101, jan. feb. mar. 2002



Sten Johansson estas svedo, kiu naskiĝis en 1950. Li komencis traduki literaturon el la sveda al Esperanto en 1982, kaj verki originale en 1986. Li ricevis plurajn premiojn en Belartaj Konkursoj ekde 1987. Li verkas ĉefe novelojn kaj krimromanetojn. Kreis la TTT-ejon «Originala literaturo en esperanto».

Verkoj originalaj: «Denaska kongresano», «Ĝis revido, krokodilido!», «Interkona mateno», «Mistero ĉe Nigra Lago», «Falĉita kiel fojno», «Trans maro kaj morto», «Neĝo kaŝas nur...», «La krimo de Katrina», «Dis!», «Kion ajn», «Vojaĝo kun Katrina», «Memor' mortiga», «Katrina malfruas», «Pasteĉo».

Li ankaŭ multe tradukis, i.a. verkojn de August Strindberg kaj Selma Lagerlöf.

(Laŭ la Leksikono pri Esperantlingvaj verkistoj «Ordeno de Verda Plumo» de Josip Pleadin – Tiu libro kaj ankaŭ la aliaj de Sten Johansson bedaŭrinde ne troviĝas en la Katalogo 2010 de nia Libroservo... Ne hezitu tamen mendi ilin, mi certas, ke nia sindonema respondeculino elturniĝos por ilin trovi!).

Jen nun ekstrakto, kiu devus sproni vin pli ofte partopreni Esperanto-renkontiĝojn!

Stranga, vera stranga, nia konduto dum tiu Esperanto-renkontiĝo! Estus interese scii, kiel la aliaj partoprenantoj perceptis ĝin. Sed tiam ni ne oferis al tiu demando eĉ unu solan penson. Ni tute fajfis pri la programo kaj pri la aliaj ĉeestantoj. Aŭ – ĉu mi kontentiĝu atesti nur pri mi mem? Do, mi fajfis pri ĉio cetera, kaj ankaŭ ŝi ŝajnis tion fari. Strange, sendube.

Oni eĉ povus diri, ke ni agis iom aplombe, fieraĉe. Nu, por mi tio ne estis aparta strangaĵo. Ja mi okupiĝis pri Esperanto ĉefe por renkonti ŝin. Sed por ŝi devus esti alie. Ĉu ŝi ne kutimis viziti Esperanto-aranĝojn? Efektive mi neniam demandis ŝin, tamen mi supozis, ke eble jes. Sendube ŝi havis konatojn, eĉ amikojn, eble eksamatojn, amase inter la kongresanoj, sed tiujn ŝi plene neglektis, dividante sian tempon ĉefe kun mi. Kion ili pensis? Eble ili indulge simple konstatis: “Nu, Karina refoje enamiĝis, do ni ne atendu de ŝi normalan konduton”.

Antaŭ unu jaro mi unuafoje renkontis ŝin dum kunveno de SEJU en iu junulargastejo. Ni kantis *Mariŝa kisu min*, kaj ŝajnis al mi, ke ŝi rigardis ĝuste min dum tiuj vortoj. «Nur neniu junuleto amas min», kantis Karina ĵetante al mi petegan rigardon, ŝajne. Pli malfrue ŝi klarigis al mi, ke ŝi rigardis min nur por provi

distingi la vortojn de la kanto, kiujn ŝi ne perfekte memoris. Stranga klarigo, se konsideri, ke mi sciis ĝin eĉ malpli bone. Tamen mi rapide lernis la kanton. Ja mi ĉiam rapide lernas – almenaŭ kantotekstojn...

En la dua tago oni disdividis taskojn. Mi akceptis la respondecon verki flugfolion pri lingva diskriminado, disdonotan al svedaj gejunuloj. Hazarde ankaŭ Karina anoncis sin kiel volontulon por tiu sama tasko. Aŭ ĉu ŝi unue, kaj mi nur poste anoncis min? La detaloj jam delonge kaŝiĝis sub la polvo de forgeso. Ĉiuokaze ni sidis en la ĝardeno, sub ĉerizarbo plena de rikanantaj pigoj, kun paperoj kaj skribiloj, kune kovante tiun komunan taskon. Mi cerbumis zumkantante gajan melodion, kiu eknestis en mia kapo. Eskapis el inter miaj lipoj iuj vortoj: “Karina kisu min, sen peto al patrin’...” Ŝi ridis – kaj obeis. Mi reciprokis. Ĉu tiu informfolio entute iam iĝis preta? Sendube ne. Jen eble la kaŭzo, ke la lingva diskriminado ne ĉesis.

Kiam ni jam iĝis firma duopo, kaj mi ĉesis frekventi SEJU-kunvenojn, mi komprenis, ke Karina estas vera movadulo. Malkiel mi, ŝi ne uzis la Esperantomovadon nur por renkonti iun, sed aktivis plu en diversaj organizaj funkcioj, kaj plu vizitadis kunvenojn, seminariojn, kongresojn, ŝajne negrave ĉu kun aŭ sen mi.

Kiel esperantigi proprajn nomojn - 11 -

■ Ni konsideru nun la nomojn en kiuj troviĝas la grupo **-qu-**. En la esperantaj vortoj el franca fonto tiuj du literoj fariĝas, jen **-kv-**, jen simpla **-k-**. Plejofte la simpla litero **-k-** respondas al **-qu-** de la franclingvaj vortoj. Abundas tiaj ekzemploj en PIV: **Afriko** (*Afrique*), **akiri** (*acquérir*), **Atlantiko** (*Atlantique*), **Bekerelo** (*Becquerel*), **briko** (*brique*), **butiko** (*boutique*), **Dunkirko** (*Dunkerque*), **kajo** (*quai*), **kinino** (*quinine*), **Kebeko** (*Québec*), **manki** (*manquer*), **Markizoj** (*Marquises*), **Martiniko** (*Martinique*), **masko** (*masque*), **Moniko** (*Monique*), **piki** (*piquer*), **Rokforto** (*Roquefort*), **sufoki** (*suffoquer*) ktp. Mi do proponas similan esperantigon por multaj propraj nomoj, unue geografiaj, inkludante la nomojn entenantajn nur **-q-**, sen **-u-**.

Blanquefort.	Blankeforto.
Carquefou / carquefolliens.	Karkefelo.
Lesquin.	Leskeno.
Locmariaquer.	Lokmarjakero.
Manosque / manosquins.	Manosko.
Marquenterre.	Markentero.
Monflanquin.	Monflankeno.
Le Pecq / alpicois.	Alpeko.
Le Petit Quevilly / quevillois.	Kevilio.
Pontacq.	Pontako.
Pont-l'Évêque / pontépiscopiens.	Pontepiskopo.
Port-des-Barques.	Pordebarko.
Le Quesnoy (<i>kenua</i>) / quercitains.	Kesnojo.
Quesnoy-sur-Deûle / quesnoysiens.	Kesnojo-ĉe-Deŭlo.
Questambert (<i>kestamber</i>).	Kestambero.
Quetigny.	Ketinio.
Queyras.	Kejraso.
Quézac.	Kezako.
Quiberon.	Kiberono.
Quierzy.	Kierzio.
Quiévrain.	Kievreno.
Quillan / quillanais.	Kiljano.
Quimper / quimperois.	Kimpero.
Quimperlé / quimperlois.	Kimperleo.
Quintin.	Kinteno.
Le Relecq-Kerhuon / relecqois, kerhorres.	Relekeruo.
Riquewih.	Rikviro.
Rocquencourt.	Rokenkuro.
Roucq.	Ruko.
Roquebrune.	Rokbruno.
Roquecourbe / roquecourbins.	Rokekurbo.
Roquemaure / roquemaurois.	Rokmaŭro.
Roquevaire / roquevairois.	Rokvajo.
Saint-Quentin / saint-quentinois.	San-Kenteno.
Saint-Riquier.	San-Rikjero.
Le Touquet.	Tuketo.
Villequier.	Vilkjero.
Wasquehal (<i>ŭaskal</i>) / wasquehaliens.	Vaskalo.

■ Ankaŭ familiaj nomoj estas esperantigeblaj sammaniere:



Blanqui/Blankio

Blanqui.	Blankio.
Duquesne.	Dukeno.
Esquirol.	Eskirolo.
Floquet.	Floketo.
Fouqué.	Fukeo.
Fouquet.	Fuketo.
Franquin.	Frankeno.
Hennebique.	Henebiko.
Hocquart.	Hokaro.
Jacquemart.	Ĵakmaro.
Lalique.	Laliko.
Lamotte-Picquet.	Lamot'-Piketo.



Queneau/Keneo

La Quintinie.	Lakintinio.
La Rochejaquelein.	Laroŝejakleno.
Levesque.	Levesko.
Pasquier.	Paskjero.
Pecqueur.	Pekeŭro.
Queneau.	Keneo.
Quesnay (<i>kene</i>).	Kenajo.
Quesnel (<i>kenel</i>).	Kenelo.
Quinault.	Kinaŭo.
Quinet.	Kineto.
Quinton.	Kintono.
Rennequin.	Renekeno.
Riquet.	Riketo.
Saint-Jacques.	San-Ĵako.
Tocqueville.	Tokvilo.
Vicq d'Azir.	Vikdaziro.

■ En kelkaj esperantaj vortoj de franca deveno la grupo **-qu-** fariĝis **-kv-**. Jen ekzemploj troveblaj en PIV: **akvarelo** (*aquarelle*), **akvario** (*aquarium*), **Akvitanio** (*Aquitaine*), **elokventa** (*éloquent*), **kvar** (*quatre*), **kvanto** (*quantité*), **kverelo** (*querelle*), **kvitanco** (*quittance*), **kvociento** (*quotient*), **jonkvilo** (*jonquille*). Tio troveblas precipe ĉe la komenco de la vortoj, kaj en vortoj el latina deveno. En la propraj nomoj ĝi povas utili en mallongaj vortoj, por la skriba rekonebleco, kaj por eviti homonimecojn, ekz. peketo kaj Pektiveto, kojlo kaj Kvojlo. Ĉi-sube estas geografiaj nomoj, kiujn mi proponas esperantigi tiel:

Les Lecques.	Lekvo.
Quercy.	Kvercio.
La Queue-en-Brie.	Kveo-en-Brio.
Quissac (<i>kuisak</i>).	Kvisako.

■ Mi same proponas esperantigi kelkajn familiajn nomojn:

Braque.	Brakvo.
Lapicque.	Lapikvo.
Marquet.	Markveto.
Pecquet.	Pektiveto.
Queuille.	Kvojlo.

■ Pri la grupo **-gu-**, ni devas unue forigi la okazojn, en kiuj ĝi estas lokita tuj antaŭ konsonanto; tiam konserviĝas la u, ekzemple en **Gujano** (*Guyane*), **Gujeno** (*Guyenne*), **gutaperko** (*gutta-percha*), **Gutenberg** (*Gutenberg*), **Gustavo** (*Gustave*). Kiam la grupo **-gu-** estas antaŭ vokalo, la afero estas simila al tiu de la grupo **-qu-**: ĝenerale ĝi respondas al la simpla litero **-g-** en esperanto, kelkfoje ĝi respondas al la grupo **-gv-**.

■ Oni trovas en PIV multajn ekzemplojn kun la simpla litero **-g-**: **gerilo** (*guerilla*), **Gernezejo** (*Guernesey*), **gilotino** (*guillotine*), **girlando** (*guirlande*), **gitaro** (*guitare*), **Kergelenoj** (*Kerguelen*), **lango** (*langue*), **ligo** (*ligue*). Multaj geografiaj nomoj povas esti esperantigitaj tiel:

Camargue.	Kamargo.
Guebwiller (<i>gebviler</i>).	Gebvilero.
Guérande / guérandais.	Gerando.
Guéret / guérétois.	Gereto.
La Guerche.	Gerĉo.
Guéthary / guétariars.	Getario.
Guilherand-Granges (<i>gijeran...</i>) / guilherandais-grangeois.	Giljeran'-Granĝo.
Guilvenc / guilvinistes.	Gilvineko.
Guînes / guinois.	Gino.
Guingamp / guingampais.	Gingampo.
Guipavas / guipavasiens.	Gipavaso.
La Hague.	Lahago.
Huningue / huninguois.	Huningo.
Isbergues / isberguois.	Isbergo.

Labruguière.	Labrugjero.
Laguiole (<i>lajol</i>).	Lagjolo.
Lègevin.	Legeveno.
Lespugue.	Lespugo.
Longuenesse / longuenessois.	Longeneso.
Longueville.	Longevilo.
Perros-Guirec / perrosiens.	Perosgireko.
Pouliguen.	Puligeno.
Rouergue.	Ruergo.
Saguenay.	Sagenajo.
Saint-Guilhem.	San-Giljemo.
Sorgues / sorguais.	Sorgo.
Tréguier.	Tregjero.

■ Ankaŭ por familiaj nomoj, mi proponas tiajn esperantigojn:

	Guérin.	Gereno.
	Guesde.	Gesdo.
	Guibert.	Giberto.
	Guillaume.	Giljaŭmo.
	Guillemin.	Gilmeno.
	Guillotín.	Giloteno.
	Guitry.	Gitrio.
	Guitton.	Gitono.
	Guizot.	Gizoto.
	Ipousteguy.	Ipustegio.
	Ladoumègue.	Ladumego.
	Lafargue.	Lafargo.
	Lebesgue.	Lebego.
	Lesdiguières.	Ledigjero.
	Perdiguiér.	Perdigjero.
	Radiguet.	Radigeto.


La gilotino de **Giloteno**

■ Ĉi-sube estas ekzemploj, en kiuj la franca **-gu-** respondas al la esperanta **-gv-**: **Gvadelupo** (*Guadeloupe*), **gvati** (*guetter*), **gvidi** (*guider*), **Gvineo** (*Guinée*), **Gvatemalo** (*Guatemala*), **Langvedoko** (*Languedoc*), **langvoro** (*langueur*). Mi proponas esperantigi kelkajn proprajn nomojn tiel, por la samaj motivoj kiel por **-kv-**, sed mi trovis malmultajn ekzemplojn:

Guise (*guiz*) / guisards. **Gvizo.**

■ Konklude, la grupoj **-gu-** kaj **-qu-** de la francaj propraj nomoj estas ĝenerale esperantigeblaj per **-g-** kaj **-k-**, kiel **Gernezejo** kaj **Afriko**. En iuj okazoj oni povas uzi **-gv-** kaj **-kv-** se tio helpas por la rekonebleco aŭ por eviti nedeziratajn homonimojn, ekzemple en **Langvedoko** kaj **Akvitanio**.

Andreo Andrio



Raymond Radiguet
Rajmondo Radigeto

Kun Diablo en la korpo

en traduko de

Michel Duc Goninaz
Mikaelo Duk Goninazo

A5, 140 paĝoj, 16 €

ĉe via preferata libroservo.

Kelkaj vortoj pri la Parkinson-malsano.

Pluraj malsanoj ekzistas kaŭze de la degenerado de neŭroj.



James Parkinson

Se oni multe parolas pri la **Alzheimer-malsano** (*alchajmero*), oni malpli ofte parolas pri la **Parkinson-malsano**.

Ŝajnas, ke ĉiuj homoj konas tiun malsanon. Fakte ne estas vere. Ĝi estas kompleksa, malfacile komprenebla, kaj de la trafitoj kaj de la proksimumoj. Estas tre malfacile lukti sole. Necesas havi helpon. Sed de kiu? - de la familimembroj, de la neŭrologo, se necese de psikologo (povas esti angoro kaj deprimo).

En 1817, Sir James Parkinson priskribis unuafoje la malsanon, kiun oni nomas per lia nomo.

En 1865 Trousseau {truso} klarigis, ke ekzistas formoj de tiu ĉi malsano sen tremadoj. Li, la unuan fojon, parolas pri la malrapideco de la spontanaj movoj (akinezio).

En 1872 Charcot {ŝarko} klarigis la fenomenojn de rigideco.

Tremado, akinezio kaj rigideco konsistigas la tri plej gravajn simptomojn de la malsano; ankaŭ la skribkapablo difektiĝas, tio nomiĝas *mikroskribo*, ĉar la skribo iĝas pli kaj pli malgranda

La malsano sin difinas per *cerba lokiĝo* kaj *atingo de la nigra substanco*. En Francio oni kalkulas, ke proksimume 150 000 personoj (10 000 pliaj jare) vivas kun tiu ĉi malsano.

Oni diras, ke estas malsano malrapide evoluiva.

Ekzistas kuraciloj por helpi la malsanulojn, ĉefe la *levodopao*; kaj en laboratorioj multe da esploroj strebas por malkovri la kaŭzojn de tiu malsano kaj la rimedojn por kuraci la malsanulojn.



Armand Trousseau



Jean-Martin Charcot

Kiam la neŭrologo anoncis al mi, cetero sen reteno: «Vi suferas de **Parkinson-malsano**» li aldonis: «Tio ne mortigos vin!»

Certe li pravas, sed tio multe ĝenas min en la ĉiutaga vivo, ĉar manifestiĝas artikaj doloroj, formikadoj en la membroj, kio nokte devigas min ellitiĝi, dum momento sen rekoneblaj kaŭzoj oni estas lacega, ktp.

Ekde tri jaroj mi kunvivas kun «James», tiel mi nomas la malsanon, ĉiuj tagoj ne estas facilaj, sed ekzistas, laŭ mi nur unu vojo: akcepti, kion la vivo trudas al ni, ĉu ne?

Chantal Millet
Saumur, Aprilo 2010

NDLR: kelkaj eroj el ĉi artikolo ni uzis por pliriĉigi la vikipedian artikolon pri la temo.

Komuniko de FEI (Franca Esperanto- instituto)

La membroj de Franca Esperanto-Instituto, instituto komuna al SAT-Amikaro kaj al Unuiĝo Franca por Esperanto, kunsidis la 25-an de oktobro en la sidejo de UFE. De unu jaro, okazis 22 ekzamensesioj: 72 kandidatoj por la *Atesto pri Elementa Lernado*, 19 por la *Atesto pri Praktika Lernado*, 1 por la *Atesto pri Supera Lernado* kaj 4 por la *Atesto pri Kapableco* pri pedagogio.

Tiuj nombroj estas **nekontentigaj**. Tial FEI instigas ĉiujn kursgvidantojn, sisteme trapasigi la unuan nivelon (Ateston pri Elementa Lernado) al siaj lernantoj, fine de la kurso.

Raporto de la kasisto:

Enspezoj : 679 €,
elspezoj : 508,27 €
Pozitiva saldo : 170,73 €
En kaso, je tiu tago : 5266,44 €

Nova sekretario : Ĵak Le Puil
Nova vicsekretario : Janine Dumoulin

Precizigojn pri la ekzamenoj en
<http://esperanto.instituto.free.fr>

Ĵak Le Puil

Beziro (34)

Sabaton la 24an de Aprilo, C.B.E. kunvenis en la M.V.A. je la 10 H. Dominique brazila amiko de Véronique Bichon prezentis kaj komentis bildojn pri sia lando Brazilo.

Tiuj bildoj montris novajn vizaĝojn. La karnavalaj festoj malsamas laŭ la urboj. Ĉiu regiono havas siajn tradiciajn kamparajn muzikojn kaj dancojn. Dominique klarigis la diversajn de la nordo ĝis la sudo pri la loĝantoj, ilia kutima vivo laŭ ilia religio aŭ ilia loka ĉirkaŭaĵo. Li montris kelkajn allogajn pladojn ofte kun nigraj aŭ ruĝaj fazeoloj. Ni vidis bildojn pri strangaj bestoj, belaj birdoj aŭ koloregaj floroj. Dominique afable respondis al la nombraj demandoj de la geesperantistoj. Ĝis nun ni konis ĉefe la regionon de Rio-de-Janeiro. Post tiu prelego ni scias, ke Brazilo la lando de la piedpilko kaj de la *capoeira* estas vasta kaj diversa. La marĉa regiono tiel granda kiel la amazona rivero estas la du elementoj, kiuj utilas pri la planeda klimato.

Ni kune tagmanĝis, kaj kiel kutime salatoj kaj kukoj estis nombraj. La etoso estis gaja, kaj ni multe babilis parolante pri vojaĝoj kaj projektoj.

La suno varmegis, kiam ni alvenis al la Malnova Tombejo, por memori nian karan prezidanton, kiu forpasis en Aprilo 2009. Ni metis memorplaton sur ŝian tombon.

Geneviève

2010: nova orientiĝo por Greziljono.

Post malfacila jaro, Esperantista Kulturdomo Greziljono ekkonstruas sian estontecon. Interesa ŝanĝo estas, ke du gravaj francaj Esperanto-asocioj (nome: SAT-Amikaro kaj UFE) ambaŭ pretas partopreni en la estonta administrado. Nova Komitato estos elektita la 29an de majo, kun 12 membroj, kaj inter la 19 kandidatoj staras UFE kaj SAT-Amikaro. Cetere, la jarkunsido de SAT-Amikaro en Hillion dediĉis laborgrupon al la temo: rilatoj kun la franclingvaj kulturcentroj. Temis ankaŭ pri Kvinpetalo, en Bouresse, ĉar ambaŭ bezonas homfortojn kaj gastojn, kaj kalkulas pri la efektiva helpo interalie de SAT-Amikaro.

Dume preskaŭ finiĝis la jura reguligo de la Esperantista Kulturdomo Greziljono, sed daŭre pripensindas, kiel plej oportune strukturi ĝin estonte, tiel ke, ekzemple, oni pli klare dispartigu administradon de la bieno mem kaj organizo de la kultura programo. Tio estu unu el la dosieroj pristudindaj de la nova Komitato. Ankaŭ necesajn konstru-laborojn oni komencis plani. Ekspertiza vizito de la kastelo

Literaturaj Konkursoj en Esperanto

La asocio ESPERANTO, KULTURO kaj PROGRESO prezentas la literaturajn konkursojn «Poeziaj Ludoj de Rusiljono» kaj «Rusiljona Premio de Verkistoj» organizatajn de franca asocio «Groupe Poétique et Artistique du Roussillon» (Poezia kaj Arta Grupo de Rusiljono).

En 2009, pligrandigis la nombro da premioj kies partopreno eblas esperantlingve: la premioj «René kaj Colette Llech-Walter», «Isabelle Robert», «de Lernejoj» kadre de la «Poeziaj Ludoj» kaj la premio «de Verkistoj». Specialaj kondiĉoj por la afrika movado kaj la franclingvanoj.

Malofte okazas ke ne-esperantista asocio organizas esperantajn premiojn. Gravas ke ni partoprenu kiel eble plej nombraj, tiel la premioj fariĝos tradiciaj. <http://sites.google.com/site/konkursojenperpignan/>

Jean-François Passarella

La asocio «Esperanto, Kulturo kaj Progreso» organizas ankaŭ la INTERNACIAN SEMAJNON de ESPERANTO en Sète de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto 2010. <http://pagesperso-orange.fr/nikolao/esperanto.html>

MIREGE 2 en Bulgario

La lastan semajnon de aŭgusto 2010 (21 – 28/08/2010) MIREGE 2 okazos en POSKI TRAMBEŝ (Bulgario).

Mirege estas internacia renkontiĝo por gejunuloj inter 13/17 jaraĝaj. Kiel en Mirege 2009 en Baugé (Francio - 49) subvencipeto apud eŭropa agentejo estis plenigita kaj sendita. Respondecaj pri la renkontiĝo Mariana Gencheva. Diversaj artaj aktivaj (muziko, pentrado, kantado, dancado, turismo) estos proponita al la gejunuloj.

Devus partopreni kvar landoj: Italio, Hungario, Bulgario kaj Francio.

Por kompleti la francan junan skipon, ni ŝatus aldoni 2 aliajn gejunulojn inter 13/17jaraĝaj.

Akompanos la gejunulojn: Jannick HUET-SCHUMANN el Rennes kaj Franjo LEVEQUE/Guy MARTIN el San-Briego.

Deziri trapasi la somerfinon en Bulgario estas vera bona ideo kaj solvo inter eŭropaj gejunuloj en esperanta medio.

Alklaku la ĉi-suban ligan kaj vizitu la lokon de la renkontiĝo.

http://www.lesopark-bg.com/index_en.php

Por plikoni kontaktu:

Franjo LEVEQUE - Guy MARTIN 09 53 92 77 37 - 06 76 27 51 78

leveque.franjo@gmail.com

Jannick HUET-SCHUMANN 02 99 83 69 86

jannick.huet@free.fr

Greziljono (49)

okazis la 18an kaj 19an de marto, kiu analizis la bezonojn je hejtado, novaj duŝoj (eĉ interne de ĉambroj), novaj ŝtuparoj (por ebligi reuzi la duan etaĝon)...

Sed eĉ antaŭ tio, oni ne interrompu la vivon de la kastelo. Kvankam neces mallongigi la somerajn staĝojn 2010 (de la 17a de Julio ĝis la 14a de Aŭgusto) ĝis ni trovos novajn aktivulojn, organiziĝis, de la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo, printempa semajno pri «Esperanto laŭ matematika vidpunkto», kun deko da partoprenantoj sub gvidado de Christian Rivière. Krom matematika terminologio kaj «matematika strukturo» de la Esperanto-gramatiko, ni trovis tempon por matematikaj ludoj (ekzemple teoremo de kalisunoj aŭ pavimado de triangulo per sfinksoj), muzikaj vesperoj...

Por pruvi nian novan orientiĝon, kelkajn somerajn instruistojn ni venigos de oriento, igante tiel la etoson pli internacia kaj des pli instiga al praktikado de Esperanto. Interalie de Pollando: dum tri

semajnoj, Tomasz Chmielikgvidos tradukgrupon al Esperanto de franclingvaj artikoloj de Edmond Privat, kaj Georgo Handzlik, krom kurso pri konversacio, prezentos sian teatraĵon Ludoviko Lazaro. Eĉ tridekjara tuluzano Christophe Chazarein ĵus spertiĝis dum unu jaro en Bjalistoko. Sed ankaŭ venos instruistino el Rumanio (Aurora Bute), kaj tamen kelkaj el Francio (Jean-Luc Kristos, Daniel Biro-Walker...). Se vi volas provi teatradon, tion vi povos sub gvidado de Rusino Nina Korjenevskaia. Patrick Lagrange klarigos astronomion kaj montros al vi la planedojn kaj stelojn per du teleskopoj, Caroline Mauboussin instruos bindadon...



Krome, oni pristudos la tiklan demandon pri Esperanto-ekzamenoj tra komparo de kvar ekzamen-sistemoj, tiuj de Franca Esperanto Instituto (antaŭ dudek jaroj kaj nun), tiu de UEA-ILEI kaj la nova laŭ la Eŭropa Referenckadro. Fakte ne eblas afiŝi la tutan programon en tiu ĉi artikolo, sed ĝin vi trovos en la retejo www.gresillon.org.

François Lo Jacomo

Minsko (BLR)

19-30/07/2010 : esperant-lingva teatro-staĝo



Dusemajna intensiva trejnado kun multaj instruistoj kaj diversaj kursoj : improvizata teatro, scena esprimado, ritma dancado, parolprononco, kantado, bio-mekaniko...

La staĝo interesos ĉiujn amantojn de amatora aŭ profesia teatro.

Ĝi estos gvidata de spertaj instruistoj de la Akademio de Artoj de Minsko. Ĉiuj kursoj estos en la rusa kun samtempa interpretado al esperanto, tiel ke vi povu plene malkovri la teatro-lernadon tian, kian oni instruas ĝin en rusparolantaj landoj.

Je la fino de la staĝo okazos spektaklo por la bjelorusa publiko. La spektaklo utiligos la ekzercojn kaj verkojn prilaboritajn dum la staĝo.

Retejo : www.minsko.esperanto.org
Retadres* minska.esperanto@orange.fr
Poŝta adreso: 14 rue de la Tour d'Auvergne
75009 Parizo / FRANCIO

Tel/Faks : +33 142 813 396 Postel : +33 615 199 248

Esperantistoj aktivas

Sadirako (33)

Okaze de la «Forumo de la Asocioj», kiu okazis en Sadirako (Ĝirondio) kiel ĉiujn jarojn, mi prezentis standon pri Esperanto. (La 21-an de marto, same, mi denove prezent[is] miajn librojn okaze de la 1-a «Salono de la libro».)

Por kelkaj, kiuj ankoraŭ ne bone min konas, relegu sur «La Sago» la artikolon «Mesaĝo laŭ mia ridpunkto» kiu aperis post la Bordoza kongreso (2007, mi kredas) kiam mi «diservis» sabaton vespere kaj tiel ridigis la publikon.

Kamaradece via
Mikaelo
la barbulo kun specialaj lipharoj



Ni pozitivu !

Okaze de la kongreso en Hiliono, mi havis la plezuron ricevi atakon pro mia «Ĉe la lago» far kelkaj virinoj, kiuj opiniis, ke tiu BD ⁽¹⁾ prezentas «tre malbonan bildon de la virino», kio estas ĝentila maniero diri ke ĝi estas «virvireca».


Sed evidente ne! Mi ja havas dokumenton subskribitan de mia edzino kiu atestas ke ĝi tute ne estas tia. (Nerefutebla pruvo, ĉu ne?)

Pli serioze, mi provis kompreni kial oni tiel taksas tiun BDn. Al mia demando, jen la du ĉefaj argumentoj, kiujn «iŝi» prezentis:

- la virino estas supraĵa, zorgante nur pri sia aspekto;
- la BD ne enscenas virojn.

Tuj oni povas konstati ke la kritikantinoj enfokusigas sin sur la patrino, la rolulo kiu ĝenas, ignorante la filinon kaj neante la viron.

Nu, mi ja grandparte konsentas pri la eco



de la patrino, sed kiel **karikaturado de burĝino**, ne de **ĉia ajn virino**.

Tiaj virinoj ekzistas, kial ne ensceniĝi ilin, ĉefe kiam oni tute ne celas prezenti ilin kiel universalan modelon? Plej bona pruvo estas la ekzisto de la filino – kiu fakte pli ĉefe rolas ol la patrino – kaj kiu estas strikte la malo de la patrino: ŝi estas mensklara, kaj ne tre zorgas pri sia aspekto. Kial do oni rifuzas vidi inan specimennon el tiu ina rolulo?

Ja la BD entenas viran rolulon, kaj tio ekde la 4a epizodo. Efektive li ne ofte aperas fizike, tamen li ĉiam ĉeestas, minimume simbole, kiel gvidlinio kaj por la patrino, kiu bezonas je ajna prezo, certigi al si, ke ŝi plu kapablas allogi, kaj por la filino kiu timas la perdon de ekskluziveco en la amo de sia patrino. El la tri roluloj, ja la viro estas la plej ventkapa: memfida, elmontrigema, pretendema, kaj ne tre inteligenta: ja li fulmorapide perdis ŝakludante kontraŭ la filino. Sed strange, li iĝis travidebla al miaj kontestantinoj...



Ŝajnas ke ni ŝuldas tiun sintenon al la nuna kulturo pri «pozitiveco»: kiam oni parolas pri io, nepre nun oni estu «pozitiva», estas ne bele, ne etike, substreki negativajn trajtojn de io ajn. Komparu kun la reagoj de kelkaj pri la kovrilpaĝo de La Sago pri la kulturdomoj bildigitaj kiel ruinoj: oni ne prezentu ilin difektitaj, eĉ se tio celas draste aŭdigi alarmon, same kiel oni ne prezentu virinon supraĵa, eĉ se ekzistas kelkaj tiaj... Ni konsciu ke tiu mensa kultura konformigado utilas al la reganta ideologio: ankaŭ kapitalismon oni konsideru pozitive: paroli pri ĝiaj negativaj flankoj estas «politike nekonvena».

Konklude, mi aludos al la efemera aperigo de «La kastelnova grupo». En ĝi, estis kvar viraj roluloj, el kiuj tri ne aparte brilis. Tamen neniu virino plendis pro la malbona bildo de tiuj viroj... eĉ ne viroj cetere – kvankam kelkaj, en nombro ne nula, petis ke mi rapide revenigu la lagulinojn....

Serĝo Sir'

⁽¹⁾ mallongigo de Bild-Deliraĵo (Taksas ĝin delireca mi, ne la atakantinoj.)

